La Atesto de Randolfo Kartero

By Howard Phillips Lovecraft.

LA ATESTO DE RANDOLFO KARTERO

from "The Statement of Randolph Carter" by

H. P. LOVECRAFT

Premsigno

La Atesto de Randolfo Kartero

Mi ripetas al vi, sinjoroj, ke via inkvizicio estas senfrukta. Detenu min ĉi tie por eterno se vi volas; malliberigu aŭ ekzekutu min se vi devas havi viktimon por satigi la iluzion, kiun vi nomas justeco; sed mi povas diri nenion pli ol mi jam diris. Ĉion, kion mi povas memori, mi diris kun perfekta sincereco. Nenio estis distordita aŭ kaŝita, kaj se io restas malklara, estas nur pro la malluma nubo, kiu venis super mian menson—tiu nubo kaj la nebula naturo de la teruroj, kiuj alportis ĝin al mi.

Denove mi diras, ke mi ne scias kio okazis al Harlejo Vareno; tamen mi pensas—preskaŭ esperas—ke li estas en paca nekonscio, se estas ie, tia benata afero. Estas vera, ke dum kvin jaroj mi estis lia plej proksima amiko, kaj parta kunhavanto de liaj teruraj esploroj pri la nekonato. Mi ne neos, kvankam mia memoro estas necerta kaj malklara, ke atestanto de vi eble vidis nin kune, kiel li diras, sur la Gajnesvila Vojo, promenante al la Granda Cipresa Marĉo, je la dek unu kaj duono en tiu terura nokto. Ke ni portis elektrajn lanternojn, ŝpatojn, kaj kuriozan bobenon de drato kun alfiksataj instrumentoj, mi eĉ atestos; ĉar ĉiuj tiuj aferoj ludis rolon en la ununura hida sceno, kiu restas bruligita en mia skuita memoro. Sed pri tio, kio sekvis, kaj pri la kialo, pro kiu oni trovis min sola kaj stuporita en la rando de la marĉo en la sekvan matenon, mi devas insisti, ke mi scias nenion krom tion, kion mi jam diris al vi denove kaj denove. Vi diras al mi, ke estas nenio en la marĉo aŭ proksime de ĝi, kio povus formi la scenejon de tiu timiga epizodo. Mi respondas, ke mi sciis nenion krom tion, kion mi vidis. Vizio aŭ koŝmaro, ĝi eble estis—vizio aŭ koŝmaro, mi fervore esperas, ke ĝi estis—tamen ĝi estas ĉio, kion mia menso konservas pri tio, kio okazis en tiuj ŝokaj horoj post kiam ni foriris el la vido de homoj. Kaj kial Harlejo Vareno ne revenis, li aŭ lia ombra animo—aŭ ia sennom*aĵo*, kiun mi ne povas priskribi—sola povas diri.

Kiel mi jam diris antaŭe, la strangaj studoj de Harlejo Vareno estis bone konataj de mi, kaj iom partoprenataj de mi. El lia vasta kolekto de strangaj, maloftaj libroj pri malpermesitaj temoj, mi legis ĉiujn, kiuj estas skribitaj en la lingvoj, pri kiuj mi estas majstro; tamen tiuj estas malmultaj kompare kun tiuj en lingvoj, kiujn mi ne povas kompreni. Plejparto, mi kredas, estas en la araba; kaj la diablo-inspirita libro, kiu alportis la finon—la libro, kiun li portis en sia poŝo el la mondon—estis skribita en signoj, kies similaĵon mi neniam vidis aliloke. Vareno neniam dirus al mi, precize kio estis en tiu libro. Pri la naturo de niaj studoj—ĉu mi devas diri denove, ke mi ne plu konservas plenan komprenon? Ŝajnas al mi sufiĉe kompatema, ke mi ne faras, ĉar ili estis teruraj studoj, kiujn mi sekvis pli pro malvolonta fascino ol pro vera inklino. Vareno ĉiam dominis min, kaj foje mi timis lin. Mi rememoras, kiel mi tremis pro lia vizaĝa esprimo en la nokto antaŭ la terura okazaĵo, kiam li parolis tiel senĉese pri sia teorio, kial apartaj kadavroj neniam putras, sed ripozas firmaj kaj grasaj en siaj tomboj dum mil jaroj. Sed mi ne timas lin nun, ĉar mi suspektas, ke li konis teruraĵojn preter mia scio. Nun mi timas *pri* li.

Denove mi diras, ke mi havas neniun klaran ideon pri nia celo en tiu nokto. Certe, ĝi tre rilatis al io en la libro, kiun Vareno kunportis—tiun antikvan libron per nedeĉifreblaj signoj, kiu venis al li el Hindio antaŭ unu monato—sed mi ĵuras, ke mi ne scias, kion ni atendis trovi. Via atestanto diras, ke li vidis nin je la dekunua kaj duono sur la Gajnesvila Vojo, direktiĝantaj al la Grandan Cipresan Marĉon.11 Ĉi tiu verŝajne estas vera, tamen mi havas neniun klaran memoron pri ĝi. La bildo bruligita en mian animon estas de unu sola sceno, kaj la horo certe estis longe post noktomezo; ĉar malkreskanta lunarko estis alta en la vaporaj ĉieloj.

La loko estis antikva tombejo; tiel antikva, ke mi tremis pro la multnombraj signoj de nememoreblaj jaroj. Estis en profunda, malseketa valeto, superkreskita per trokreskanta herbo, musko, kaj strangaj rampantaj herbaĉoj, kaj plena de malklara fetoro, kiun mia senokupa imago absurde asociis kun putranta ŝtono. Ĉiuflanke estis signoj de neglekto kaj kadukiĝo, kaj mi ŝajnis plagita de la nocio ke Vareno kaj mi estis la unuaj vivantaj estaĵoj, invadinte la mortigan silenton de jarcentoj. Super la rando de la valo, pala malkreskanta

lunarko elrigardis tra la naŭzaj vaporoj, kiuj ŝajnis emani el neaŭditaj katakomboj, kaj per ĝiaj malfortaj, ŝancelantaj radioj mi povis distingi forpuŝeman aranĝon de antikvaj slaboj, urnoj, cenotafoj kaj maŭzoleaj fasadoj; ĉiuj diseriĝantaj, muske kreskitaj, kaj makulitaj de malsekeco, kaj parte kaŝitaj de la ampleksa lukseco de la malsana vegetaĵaro.

Mia unua viva impreso pri mia propra ĉeesto en tiu terura nekropolo rilatas al la ago paŭzi kun Vareno antaŭ aparta duone detruita sepultejo, kaj terĵeti kelkajn ŝarĝojn, kiujn ŝajnis, ke ni estis portantaj. Mi ĉi tiam rimarkis, ke mi havis kun mi elektran lanternon kaj du ŝpatojn, dum mia kunulo estis provizita per simila lanterno kaj portebla telefonaparato. Neniu vorto estis eldirita, ĉar la loko kaj la tasko ŝajnis konataj de ni; kaj senprokraste ni prenis niajn ŝpatojn kaj komencis forigi la herbon, herbaĉojn, kaj drivitan teron de la plata, arkaika mortejo. Post malkovri la tutan surfacon, kiu konsistis el tri grandegaj granitaj slaboj, ni retropaŝis ioman distancon por superrigardi la tomban scenon; kaj Vareno ŝajnis fari iom da mensaj kalkuloj. Tiam li revenis al la sepultejo, kaj, uzante sian ŝpaton kiel levilon, klopodis perforte levi la slabon kuŝantan plej proksime al ŝtona ruino, kiu eble estis monumento en sia propra epoko. Li ne sukcesis, kaj signis al mi veni por helpi. Fine nia kunigita forto malfiksis la ŝtonon, kiun ni levis kaj suprenklinis al unu flanko.

La forigo de la slabo rivelis nigran aperturon, el kiu torentis elfluo de miasmaj gasoj tiel naŭza, ke ni konsterniĝe resaltis pro teruro. Post intertempo, tamen, ni alproksimiĝis al la tombofoso denove, kaj trovis la elspirojn malpli neelteneblaj. Niaj lanternoj malkaŝis la supron de ŝtona ŝtuparo, gutanta per ia abomeninda ikoro de la profunda tero, kaj ĉirkaŭata de malseketaj muroj enkrustitaj de salpetro. Kaj nun unuafoje mia memoro notas parolan diskurson, Vareno alparolante min laŭlonge per sia milda tenora voĉo; voĉo aparte senperturba de niaj imponaj ĉirkaŭaĵoj.

“Mi bedaŭras, ke mi devas peti vin resti sur la surfaco,” li diris, “sed estus krimo lasi iun kun viaj malfortaj nervoj iri malsupren tien. Vi ne povas imagi, eĉ per tio, kion vi legis kaj per tio, kion mi diris al vi, la aferojn, kiujn mi devos vidi kaj fari. Estas diabla laboro, Kartero, kaj mi dubas, ĉu iu ajn homo sen kirasaj sentemoj iam povus travivi ĝin kaj supreniri viva kaj mense sana. Mi ne volas ofendi vin, kaj la ĉielo scias, ke mi estus sufiĉe feliĉa havi vin kun mi; sed la respondeco estas iusence mia, kaj mi ne povus treni

faskon de nervoj kiel vi malsupren al verŝajna morto aŭ frenezo. Mi diras al vi, vi ne povas imagi kiel la aĵo vere estas! Sed mi promesas teni vin informita per la telefono pri ĉiu movo—vi vidu, ke mi havas sufiĉe da drato ĉi tie por atingi la centron de la tero kaj reen!"

Mi povas ankoraŭ aŭdi, memore, tiujn malvarme diritajn vortojn; kaj mi povas ankoraŭ rememori miajn protestojn. Mi ŝajnis malespere anksia por akompani mian amikon en tiujn sepultejajn profundojn, tamen li pruviĝis neflekseble obstina. Iam li minacis forlasi la ekspedicion se mi persistus; minaco tiu pruviĝis efika, ĉar li sole tenis la ŝlosilon por la *aĵo*. Ĉion ĉi mi ankoraŭ povas rememori, kvankam mi ne plu scias kian *aĵon* ni serĉis. Post kiam li akiris mian malvolantan malproteston pri lia projekto, Vareno reprenis la bobenon de drato kaj ĝustigis la instrumentojn. Je lia kapjeso, mi prenis unu el la ĉi-lastaj, kaj sidiĝis sur aĝinta, diskolora tomboŝtono proksime al la ĵus malkovrita aperturo. Tiam li skuis mian manon, surŝultrigis la bobelon de drato, kaj malaperis en tiun nepriskribeblan ostejon.

Dum momento mi konservis vidon de la lumo de lia lanterno, kaj aŭdis la susuron de la drato kiam li demetis ĝin post si; sed la lumo baldaŭ abrupte malaperis, kvazaŭ turniĝo en la ŝtona ŝtuparo estus renkontita, kaj la sono formortis preskaŭ tiel rapide. Mi estis sola, tamen ligita al la nekonataj profundoj per tiuj magiaj fadenoj, kies izolaĵita surfaco kuŝis, verda, sub la baraktantaj radioj de tiu malkreskanta lunarko.

En la sola silento de tiu aĝe griza kaj dezerta urbo de la mortintoj, mia menso konceptis la plej makabrajn fantaziojn kaj iluziojn; kaj la groteskaj sanktejoj kaj monolitoj ŝajnis alpreni hidan personecon—duon-sentemon. Senformaj ombroj ŝajnis kaŭri en la pli mallumaj recesoj de la herbaĉe strangolita valeto kaj flirti kvazaŭ en ia blasfema ceremonia procesio preter la pordegoj de la diseriĝantaj tomboj en la montetflanko; ombroj, kiuj ne povus esti ĵetitaj de tiu pala, elrigardanta lunarko.

Mi konstante konsultis mian horloĝon per la lumo de mia elektra lanterno, kaj aŭskultis kun febra anksio ĉe la aŭskultilo de la telefono; sed dum pli ol kvarono da horo aŭdis nenion. Tiam malforta klakado venis el la aparato, kaj mi vokis malsupren al mia

amiko per streĉita voĉo. Antaŭtima, kiel mi estis, mi tamen estis senprepara por la vortoj kiuj venis supren el tiu preternatura kripto per akĉentoj pli alarmitaj kaj tremantaj ol iujn, kiujn mi antaŭe aŭdis de Harlejo Vareno. Li, kiu tiel trankvile forlasis min iom da tempo antaŭe, nun vokis de malsupre per tremanta flustro pli malbonaŭgura ol la plej laŭta ŝriko:

"Dio! Se vi povus vidi tion, kion mi vidas!"

Mi ne povis respondi. Senparole, mi povis nur atendi. Tiam la frenezaj tonoj revenis:

"Kartero, ĝi estas terura—monstra—nekredebla!"

Ĉi-foje, mia voĉo ne malsukcesigis min, kaj mi verŝis en la sendilon inundon da ekscititaj demandoj. Terurita, mi daŭris ripeti, "Vareno, kio ĝi estas? Kio ĝi estas?"

Denove venis la voĉo de mia amiko, ankoraŭ raŭka pro timo, kaj nun ŝajne tinkturetita de malespero:

"Mi ne povas rakonti al vi, Kartero! Ĝi estas tro tute preter penso—Mi ne aŭdacas rakonti al vi—neniu homo povus scii ĝin kaj vivi—Granda Dio! Mi neniam sonĝis pri *tio ĉi*!"

Senmoveco denove, krom mia nun nekohera torento de tremanta demandado. Tiam la voĉo de Vareno en piĉo de pli sovaĝa konsterno:

"Kartero! pro la amo de Dio, remetu la slabon kaj eliru el ĉi tio se vi povas! Rapidu!—lasu ĉion alian kaj penu atingi eksteren—tio estas via sola ŝanco! Faru kiel mi diras, kaj ne petu min klarigi!"

Mi aŭdis, tamen povis nur ripeti miajn frenezajn demandojn. Ĉirkaŭ mi estis la tomboj, kaj la mallumo, kaj la ombroj; sub mi, iu danĝero preter la radiuso de la homa imago. Sed mia amiko estis en pli granda danĝero ol mi, kaj tra mia timo mi sentis neklaran rankoron ke li opinius min kapabla forlasi lin en tiaj cirkonstancoj. Pli da klakado, kaj post paŭzo, kompatinda krio de Vareno:

"Forpiedu! Pro Dio, remetu la slabon kaj forpiedu, Kartero!"

Io en la knaba slango de mia evidente trafita kunulo deŝnuris miajn fakultojn. Mi formis kaj kriis decidecon, "Vareno, fortiĝu! Mi venos malsupren!" Sed pro ĉi tiu propono, la tono de mia aŭskultanto ŝanĝiĝis al krio de absoluta malespero:

"Ne! Vi ne povas kompreni! Estas tro malfrue—kaj mia propra kulpo. Remetu la slabon kaj kuru—estas nenio alian, kion vi aŭ iu ajn povas fari nun!"

La tono ŝanĝiĝis denove, ĉi-foje akirante pli mildan kvaliton, kvazaŭ de senespera rezignacio. Tamen ĝi restis streĉita pro zorgo

por mi.

“Rapidu—antaŭ ol estas tro malfrue!”

Mi penis ne atenti lin; penis trarompi la paralizo, kiu tenis min, kaj plenumi mian promeson rapidi suben por lia helpo. Tamen lia sekva flustro trovis min ankoraŭ tenita senmove en la ĉenoj de absoluta teruro.

“Kartero—rapidu! Ne utilas—vi devas iri—pli bone unu ol du—la slabo—”

Paŭzo, pli da klakado, tiam la malforta voĉo de Vareno:

“Preskaŭ finita nun—ne plimalfaciligu ĝin—kovru tiujn damnindajn ŝtupojn kaj kuru por via vivo—vi perdas tempon—adiaŭ, Kartero—ne revidos vin.”

Je nun la flustrado de Vareno ŝvelis al krio; krio, kiu grade plilaŭtiĝis al ŝriko plena je la tuta teruro de la epokoj—

“Malbenu ĉi tiujn inferajn aĵojn—legiojn—Mia Dio! Forpiedu! *Forpiedu!* FORPIEDU!”

Post tio estis silento. Mi scias-ne, kiom da senfinaj eonoj dum mi sidis stuporite; flustrante, murmurdirante, vokante, kriegante en tiu telefono. Denove kaj denove dum tiuj eonoj mi flustris kaj murmurdiris, vokis, kriis, kaj kriegis, “Vareno! Vareno! Respondu al mi—ĉu vi estas tie?”

Kaj tiam venis al mi la kronanta hororo de ĉio—la nekredebla, nepensebla, preskaŭ nemenciebla afero. Mi diris, ke eonoj ŝajnis pasi post kiam Vareno elŝrikis sian lastan malesperan averton, kaj ke nur miaj propraj krioj nun rompis la hidan silenton. Tamen post iom da tempo estis plua klakado en la aŭskultilo, kaj mi streĉis miajn orelojn por aŭskulti. Denove mi vokis malsupren, “Vareno, ĉu vi estas tie?”, kaj responde aŭdis la *aferon*, kio alportis ĉi tiun nubon sur mian menson. Mi ne penas, sinjoroj, klarigi tiun *aĵon*—tiun voĉon—nek mi kuraĝas priskribi ĝin detale, ĉar la unuaj vortoj forprenis mian konscion kaj kreis mensan malplenon, kiu atingas ĝis la tempo de mia vekiĝo en la hospitalo. Ĉu mi diros, ke la voĉo estis profunda; kava; gelatena; fora; netera; nehoma; nekorpa? Kion mi diros? Estis la fino de mia sperto, kaj estas la fino de mia rakonto. Mi aŭdis ĝin, kaj sciis nenion plu—aŭdis ĝin dum mi sidis ŝtonigita en tiu nekonata tombejo en la valeto, inter la diseriĝantaj ŝtonoj kaj la falantaj tomboj, la trokreskanta vegetaĵaro kaj la miasmaj vaporoj—aŭdis ĝin suprenflui el la plej internaj profundoj de tiu damninda malferma sepultejo dum mi rigardis senformajn, mortmanĝajn ombrojn danci sub malbenita malkreskanta luno.

Kaj ĉi tiu estas kion ĝi diris:
“*Vi malsaĝulo, Vareno estas mortinta!*”

The Statement of Randolph Carter

I repeat to you, gentlemen, that your inquisition is fruitless. Detain me here forever if you will; confine or execute me if you must have a victim to propitiate the illusion you call justice; but I can say no more than I have said already. Everything that I can remember, I have told with perfect candor. Nothing has been distorted or concealed, and if anything remains vague, it is only because of the dark cloud which has come over my mind—that cloud and the nebulous nature of the horrors which brought it upon me.

Again I say, I do not know what has become of Harley Warren, though I think—almost hope—that he is in peaceful oblivion, if there be anywhere so blessed a thing. It is true that I have for five years been his closest friend, and a partial sharer of his terrible researches into the unknown. I will not deny, though my memory is uncertain and indistinct, that this witness of yours may have seen us together as he says, on the Gainsville pike, walking toward Big Cypress Swamp, at half past 11 on that awful night. That we bore electric lanterns, spades, and a curious coil of wire with attached instruments, I will even affirm; for these things all played a part in the single hideous scene which remains burned into my shaken recollection. But of what followed, and of the reason I was found alone and dazed on the edge of the swamp next morning, I must insist that I know nothing save what I have told you over and over again. You say to me that there is nothing in the swamp or near it which could form the setting of that frightful episode. I reply that I knew nothing beyond what I saw. Vision or nightmare it may have been—vision or nightmare I fervently hope it was—yet it is all that my mind retains of what took place in those shocking hours after we left the sight of men. And why Harley Warren did not return, he or his shade—or some nameless *thing* I cannot describe—alone can tell.

As I have said before, the weird studies of Harley Warren were

well known to me, and to some extent shared by me. Of his vast collection of strange, rare books on forbidden subjects I have read all that are written in the languages of which I am master; but these are few as compared with those in languages I cannot understand. Most, I believe, are in Arabic; and the fiend-inspired book which brought on the end—the book which he carried in his pocket out of the world—was written in characters whose like I never saw elsewhere. Warren would never tell me just what was in that book. As to the nature of our studies—must I say again that I no longer retain full comprehension? It seems to me rather merciful that I do not, for they were terrible studies, which I pursued more through reluctant fascination than through actual inclination. Warren always dominated me, and sometimes I feared him. I remember how I shuddered at his facial expression on the night before the awful happening, when he talked so incessantly of his theory, why certain corpses never decay, but rest firm and fat in their tombs for a thousand years. But I do not fear him now, for I suspect that he has known horrors beyond my ken. Now I fear *for* him.

Once more I say that I have no clear idea of our object on that night. Certainly, it had much to do with something in the book which Warren carried with him—that ancient book in undecipherable characters which had come to him from India a month before—but I swear I do not know what it was that we expected to find. Your witness says he saw us at half past 11 on the Gainsville pike, headed for Big Cypress Swamp. This is probably true, but I have no distinct memory of it. The picture seared into my soul is of one scene only, and the hour must have been long after midnight; for a waning crescent moon was high in the vaporous heavens.

The place was an ancient cemetery; so ancient that I trembled at the manifold signs of immemorial years. It was in a deep, damp hollow, overgrown with rank grass, moss, and curious creeping weeds, and filled with a vague stench which my idle fancy associated absurdly with rotting stone. On every hand were the signs of neglect and decrepitude, and I seemed haunted by the notion that Warren and I were the first living creatures to invade a lethal silence of centuries. Over the valley's rim a wan, waning crescent moon peered through

the noisome vapors that seemed to emanate from unheard-of catacombs, and by its feeble, wavering beams I could distinguish a repellent array of antique slabs, urns, cenotaphs, and mausolean façades; all crumbling, moss-grown, and moisture-stained, and partly concealed by the gross luxuriance of the unhealthy vegetation.

My first vivid impression of my own presence in this terrible necropolis concerns the act of pausing with Warren before a certain half-obliterated sepulcher, and of throwing down some burdens which we seemed to have been carrying. I now observed that I had with me an electric lantern and two spades, whilst my companion was supplied with a similar lantern and a portable telephone outfit. No word was uttered, for the spot and the task seemed known to us; and without delay we seized our spades and commenced to clear away the grass, weeds, and drifted earth from the flat, archaic mortuary. After uncovering the entire surface, which consisted of three immense granite slabs, we stepped back some distance to survey the charnel scene; and Warren appeared to make some mental calculations. Then he returned to the sepulcher, and using his spade as a lever, sought to pry up the slab lying nearest to a stony ruin which may have been a monument in its day. He did not succeed, and motioned to me to come to his assistance. Finally our combined strength loosened the stone, which we raised and tipped to one side.

The removal of the slab revealed a black aperture, from which rushed an effluence of miasmal gases so nauseous that we started back in horror. After an interval, however, we approached the pit again, and found the exhalations less unbearable. Our lanterns disclosed the top of a flight of stone steps, dripping with some detestable ichor of the inner earth, and bordered by moist walls encrusted with niter. And now for the first time my memory records verbal discourse, Warren addressing me at length in his mellow tenor voice; a voice singularly unperturbed by our awesome surroundings.

“I’m sorry to have to ask you to stay on the surface,” he said, “but it would be a crime to let anyone with your frail nerves go down there. You can’t imagine, even from what you have read and from what I’ve told you, the things I shall have to see and do. It’s fiendish work, Carter, and I doubt if any man without ironclad sensibilities could ever see it through and come up alive and sane. I don’t wish

to offend you, and Heaven knows I'd be glad enough to have you with me; but the responsibility is in a certain sense mine, and I couldn't drag a bundle of nerves like you down to probable death or madness. I tell you, you can't imagine what the thing is really like! But I promise to keep you informed over the telephone of every move—you see I've enough wire here to reach to the center of the earth and back!"

I can still hear, in memory, those coolly spoken words; and I can still remember my remonstrances. I seemed desperately anxious to accompany my friend into those sepulchral depths, yet he proved inflexibly obdurate. At one time he threatened to abandon the expedition if I remained insistent; a threat which proved effective, since he alone held the key to the *thing*. All this I can still remember, though I no longer know what manner of *thing* we sought. After he had obtained my reluctant acquiescence in his design, Warren picked up the reel of wire and adjusted the instruments. At his nod I took one of the latter and seated myself upon an aged, discolored gravestone close by the newly uncovered aperture. Then he shook my hand, shouldered the coil of wire, and disappeared within that indescribable ossuary.

For a minute I kept sight of the glow of his lantern, and heard the rustle of the wire as he laid it down after him; but the glow soon disappeared abruptly, as if a turn in the stone staircase had been encountered, and the sound died away almost as quickly. I was alone, yet bound to the unknown depths by those magic strands whose insulated surface lay green beneath the struggling beams of that waning crescent moon.

In the lone silence of that hoary and deserted city of the dead, my mind conceived the most ghastly fantasies and illusions; and the grotesque shrines and monoliths seemed to assume a hideous personality—a half-sentience. Amorphous shadows seemed to lurk in the darker recesses of the weed-choked hollow and to flit as in some blasphemous ceremonial procession past the portals of the moldering tombs in the hillside; shadows which could not have been cast by that pallid, peering crescent moon.

I constantly consulted my watch by the light of my electric lantern, and listened with feverish anxiety at the receiver of the

telephone; but for more than a quarter of an hour heard nothing. Then a faint clicking came from the instrument, and I called down to my friend in a tense voice. Apprehensive as I was, I was nevertheless unprepared for the words which came up from that uncanny vault in accents more alarmed and quivering than any I had heard before from Harley Warren. He who had so calmly left me a little while previously, now called from below in a shaky whisper more portentous than the loudest shriek:

"God! If you could see what I am seeing!"

I could not answer. Speechless, I could only wait. Then came the frenzied tones again:

"Carter, it's terrible—monstrous—unbelievable!"

This time my voice did not fail me, and I poured into the transmitter a flood of excited questions. Terrified, I continued to repeat, "Warren, what is it? What is it?"

Once more came the voice of my friend, still hoarse with fear, and now apparently tinged with despair:

"I can't tell you, Carter! It's too utterly beyond thought—I dare not tell you—no man could know it and live—Great God! I never dreamed of *this*!"

Stillness again, save for my now incoherent torrent of shuddering inquiry. Then the voice of Warren in a pitch of wilder consternation:

"Carter! for the love of God, put back the slab and get out of this if you can! Quick!—leave everything else and make for the outside—it's your only chance! Do as I say, and don't ask me to explain!"

I heard, yet was able only to repeat my frantic questions. Around me were the tombs and the darkness and the shadows; below me, some peril beyond the radius of the human imagination. But my friend was in greater danger than I, and through my fear I felt a vague resentment that he should deem me capable of deserting him under such circumstances. More clicking, and after a pause a piteous cry from Warren:

"Beat it! For God's sake, put back the slab and beat it, Carter!"

Something in the boyish slang of my evidently stricken companion unleashed my faculties. I formed and shouted a resolution, "Warren, brace up! I'm coming down!" But at this offer the tone of my auditor changed to a scream of utter despair:

"Don't! You can't understand! It's too late—and my own fault.

Put back the slab and run—there's nothing else you or anyone can do now!"

The tone changed again, this time acquiring a softer quality, as of hopeless resignation. Yet it remained tense through anxiety for me.

"Quick—before it's too late!"

I tried not to heed him; tried to break through the paralysis which held me, and to fulfil my vow to rush down to his aid. But his next whisper found me still held inert in the chains of stark horror.

"Carter—hurry! It's no use—you must go—better one than two—the slab—"

A pause, more clicking, then the faint voice of Warren:

"Nearly over now—don't make it harder—cover up those damned steps and run for your life—you're losing time—so long, Carter—won't see you again."

Here Warren's whisper swelled into a cry; a cry that gradually rose to a shriek fraught with all the horror of the ages—

"Curse these hellish things—legions—My God! Beat it! *Beat it!* BEAT IT!"

After that was silence. I know not how many interminable eons I sat stupefied; whispering, muttering, calling, screaming into that telephone. Over and over again through those eons I whispered and muttered, called, shouted, and screamed, "Warren! Warren! Answer me—are you there?"

And then there came to me the crowning horror of all—the unbelievable, unthinkable, almost unmentionable thing. I have said that eons seemed to elapse after Warren shrieked forth his last despairing warning, and that only my own cries now broke the hideous silence. But after a while there was a further clicking in the receiver, and I strained my ears to listen. Again I called down, "Warren, are you there?" and in answer heard the *thing* which has brought this cloud over my mind. I do not try, gentlemen, to account for that *thing*—that voice—nor can I venture to describe it in detail, since the first words took away my consciousness and created a mental blank which reaches to the time of my awakening in the hospital. Shall I say that the voice was deep; hollow; gelatinous; remote; unearthly; inhuman; disembodied? What shall I say? It was the end of my experience, and is the end of my story. I heard it, and knew no more—heard it as I sat petrified in that unknown cemetery in the hollow, amidst the crumbling stones and the falling tombs, the rank vegetation and the miasmal vapors—

heard it well up from the innermost depths of that damnable open sepulcher as I watched amorphous, necrophagous shadows dance beneath an accursed waning moon.

And this is what it said:

"*You fool, Warren is dead!*"

Kolofono



“*The Statement of Randolph Carter*”

VERKO: H. P. LOVECRAFT (1925) CC-PD

SKRIBO: Wikisource (2020) CC0

“La Atesto de Randolfo Kartero”

TRADUKO KAJ ELDONO: PAUL KING (2025) CC0

Uzante anonima traduko titolita “La Deklaro de Randolfo Karter” (2023)

Kovrilo estas el *The Abbey in the Oakwood* de CASPAR DAVID FRIEDRICH (1810) CC-PD

Uzante ilojn kaj formatojn de *Standard Ebooks*

Kopirajto

Senpaga kaj Libera

Free